



Genra Egaleco

Castione della Presolana, la 16an de aprilo 2017, trejnistoj: Jeremie kaj Paulina

Kio estas genro?



Kio estas genra egaleco?



Genra malegaleco

Genra (mal)egaleco dependas interalie de la geopolitika situo. Tio signifas ke gxi povas aspekti malsame en malsamaj landoj. Estas utile lerni pri la spertoj de homoj de aliaj mondopartoj kaj kulturoj, kaj kompari ilin kun propraj spertoj. Kio estas la similajxoj kaj malsimilajxoj? Vi povas pripensi tion ekzemple surbaze de diskutoj kun samideanoj.


Feminismoj

Feminismo estas la movado por genra egaleco. Kvankam oni ofte uzas la vorton en singularo, ni preferas paroli pri feminismoj, cxar ekzistas multaj diversaj aliroj, ecx kombineblaj inter si. En diversaj lokoj kaj historiaj momentoj, kelkaj el ili povas esti pli disvastigitaj ol aliaj. Jen kvar bazaj feminismoj kaj iliaj komprenoj de genro:

Liberala feminismo	“Viroj kaj virinoj estas egalaj.”
Radikala feminismo	“Viroj kaj virinoj estas malsamaj.”
Poststrukturalisma feminismo	“Kategorioj ‘viroj’ kaj ‘virinoj’ ne ekzistas.”
Pluraneca feminismo	“Viroj kaj viroj estas malsamaj, virinoj kaj virinoj estas malsamaj.”

Pluraneco

Pluraneco (el ‘esti ano de pluraj grupoj’) estas aliro kiu traktas genron kiel nedisigeble interligita kun aliaj grupapartenoj, kiel ekzemple raso, klaso, handikapeco, agxo ktp.



La koncepto estis enkondukita de Kimberle Crenshaw, kies prelegon en la angla (kun subtekstoj en diversaj lingvoj) vi povas spekti [cxi tie](#). Vi povas legi ankaux rian anglalingvan klarigan tekston [cxi tie](#).

La esperanta vorto “pluraneco” estis kreita de Ariel Bonkorpa, kies artikolon en Esperanto vi povas legi [cxi tie](#).

Demandi la alian demandon

Sed kiel uzi pluranecan analizon en la praktiko? Mari Matsuda proponas metodon kiun ri nomas “demandi la alian demandon” (1991):

Kiam mi vidas ion kio aspektas rasisma, mi demandas “Kie estas la patriarhexeco en tio?”.
Kiam mi vidas ion kio aspektas seksisma, mi demandas “Kie estas la heteronormismo en tio?”.
Kiam mi vidas ion kio aspektas gejofobia, mi demandas “Kie estas la klasa intereso en tio?”.

Citita literaturo:

Matsuda, M. J. (1991) ‘Beside My Sister, Facing the Enemy: Legal Theory out of Coalition’, *Stanford Law Review* 43(6): 1183–92.

